

# Arbetar Esperantisten

## Laborista Esperantisto

A.-B. Arbetarnes Tr., Sthlm 1939

Nr 12  
Dec.

Redaktion: Svenska Arbetar-Esperanto-Förbundet, Barnhusgatan 8, Stockholm.  
Ansvarig utgivare: Gustav Söderkvist.

1939  
18:a jaro.

## SANKTA LUĆIO



Sur la mar' brilas stel' de arĝento  
dolĉe favoras ondoj kaj vento;  
:||: dancas la barko kiel folio;  
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio! :||:

Bone ni fartas en la barketo  
pro la dolĉega, kara venteto;  
:||: venu do, preta nun estas ĉio;  
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio! :||:

Kiu nun hejme volas restadi!  
Venu en barkon vespermanĝadi!  
:||: Venu vojaĝi, benos nin Dio;  
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio! :||:

Maro, venteto, ambaŭ ridetas,  
kaj la maristo zorgojn forĵetas;  
:||: gaje kaj ĝoje jèn lia krio!  
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio! :||:

Dolĉa Napolo, tero amata,  
per la rideto Dia benata,  
:||: vi, reĝolando de harmonio!  
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio! :||:

Kial vi haltas? De la vespero  
pure, varmete blovas aero.  
:||: Do en la barkon saltu pro tio!  
Sankta Luĉio, Sankta Luĉio! :||:

## Informoj al la anoj.

La nova regularo de SLEA redaktita en Esperanto alvenis el la presejo, kaj estas plej eble baldaŭ sendota al la kluboj. P. K. sendos cirkuleron pri tio al la kluboj.

\*

Ĉar P. K. de SAT en Parizo pro malbonaj mondeirkonstancoj estis devigata ĉesi la agadon tie, la SAT-rondo en Stokholmo estis petata transpreni la laboron. Sed poste ni pere de letero de k-do Wels, Roterdamo, estas informitaj, ke la kamaradoj en Roterdamo prenis al si la taskon. Vidu artikolon pri tio en la novembra kaj decembra numeroj de L. E.

\*

Malgraŭ la malbonaj poŝttransportebloj la SAT-anoj tamen ricevis »Sennaciulon» kun la protokolo de la SAT-kongreso de Kopenhago.

\*

La kluboj kaj la anoj estas petataj, varbi abonantojn de L. E. por la jaro 1940 kaj ankaŭ subtenantajn anojn de SLEA.

Norvega Asocio de Laborista Esperantistoj (NALE) petis pri rajto uzi nian gazeton kiel organo ankaŭ por sia organizo sammaniere kiel jam faras nia dana fratorganizo. P. K. de SLEA respondis jese, kaj tiu nova aranĝo komencas jam en la hodiaŭa numero.

Ni salutas al niaj norvegaj gekamaradoj kaj deziras bonan rezulton de nia komuna laboro por nia afero.

\*

*Atentu!* Depost nun la aparta poŝtgirokonto de nia gazeto ĉesas. Ĉiu pago devas esti farata pere de la poŝtgirokonto N:o 53160, Sveda Laborista Esperanto Asocio. Rigardu la informilon en la lasta paĝo de ĉiu numero de L. E.

Bonan Kristnaskon kaj Feliĉan novjaron!

*La sekretario.*

*Esperanta Turista Asocio's* medlemmar kallas härmed till årsmöte onsdagen den 10 januari 1940 kl. 7.30 e. m. å Jakobsgatan 32, 3 tr., Stockholm.

## La festo de Luĉio.

Al la bildo de l' titolpaĝo.

La 13-a de decembro portas en la sveda almanako la nomon Luĉio. Tiu tago estas en multaj svedaj provincoj festotago de speciala karaktero.

De kie venas la kutimo festi en la tago de Luĉio? Jes, oni ne scias. Certe tamen estas, ke tiun kutimon oni povas sekvi malantaŭen tra la tempoj, eĉ ĝis idolana epoko de nordlandoj. Kaj scienculoj diras ke la antikvaj nordlandanoj havis feston pro la reveno de la suno, tiu estas »Jul». Kaj antaŭ tiu festo estis la plej longa nokto de la jaro. Frumatene, post tiu plej longa nokto, oni per lumo festis la revenon de pli longaj tagoj per festo de lumo. Simbolo por tiu »lumo» estis juna knabino, Luĉio-novedzino, kiu, portante je la kapo kronon de kandeloj kaj sekvata de servistinoj portante kandelojn en siaj manoj, regalis al la domanoj iom da bongustaĵoj.

Venis la kristana tempo. La katolika eklezio adoptis al si la idolajn festojn, farante de ili festojn de kristana simbolo. La norda idolana Jul fariĝis festo por memorigo pri la naskiĝo de Jesuo Kristo (Kristnasko), kaj la festo de lumigo, Luĉio, ricevis kristanan sanktulinon. Legendo pri tiu sanktulino anstataŭis la antikvan idolon, la lumo kiel simbolo de la revenanta suno. Sed en la profundo de la animo, la homoj portis la amon al la lumo, la revenanta suno, la pli longaj tagoj kaj la varmo...

Unu el la legendoj pri Sankta Luĉio tekstas:

En Sirakuso vivis nobela virgulino Luĉio. Ŝia patrino estis grave malsana, sed en mirakla maniero ŝi estis resanigita. Pro ĝojo Luĉio fordonacis sian tutan doton al malriĉaj kristanoj. Ŝia fianĉo akuzis ŝin al la prefekto Paŝasio kiel kristaninon. La prefekto ordonis, ke oni kaptu Luĉion kaj metu ŝin en domon de publikulinoj. Sed oni ne povis ŝin forkonduki, neniun havis fortojn ŝin fortreni. Oni decidis ŝin bruligi en la loko, kie ŝi staris, kaj staplis

lignon ĉirkaŭ ŝi. Sed kiam oni ekbruligis la lignon per helpo de peĉo kaj oleo, la fajroj kliniĝis ne tuŝante la virgulinon. Furioze kolera la prefekto tiris la glavon kaj traboris ŝian bruston. Luĉio falis kaj mortis, estanta martiro pro sia kredo.

La sveda festo de Luĉio konformas al tiu legendo. Luĉio estas novedzino kaj pro tio ŝi portas blankan vestaĵon. La nekutimaj ornamoj estas la kandelo-krono je la kapo kaj ruĝa rubando ĉirkaŭ la talio. La etaj fajroj de la kandeloj simboligas la fajron, kiu ne faris domaĝon al Luĉio, kaj la ruĝa rubando estas simbolo de ŝia sanga morto...

El tiuj du fontoj — la idolana lumofesto kaj la senkulpa kristana virgulino, mortigita pro sia kredo je kristanismo — ni heredis nian Luĉiofeston. Kaj estas ankoraŭ kutimo, ke frumatene la 13-an de decembro, kiam oni ankoraŭ ne plene vekigis, juna knabino kun kandelkrono je la verto — se eble sekvata de kunulinoj portante kandeloj en la manoj — envenas en nian dormĉambron kaj regalias al ni vaporantan kafon kaj panon, kukon kaj torton. Ĉiu kantas la kanton de Sankta Luĉio.

Ni rajtas kredi kion ajn, ĉu pri nobela virgulino el Sirakuso, mortinta pro kristanismo; aŭ pri la revenanta al la nordaj landoj suno kaj varmo.

La temo de Luĉio estas ŝatata programpunkto en multaj organizoj. La ceremonio estas la sama kiel ĉi supre priskribata. Sed la festo ne bezonas nepre okazi en frumateno.

Rigardante la titolpaĝon de nia hodiaŭa gazeto, kun ties bildo de sveda Luĉio kaj la fama kanto Sankta Luĉio, certe vi pensas pri pli aŭ malpli belaj festoj de Luĉio. Kaj por via interna okulo certe aperas multaj el la belulinoj, kiuj je tiaj festoj portis la simbolon de lumo kaj pureco, la kandelkronon kaj la blankan vestaĵon.

## Anmälan.

Härmed anmäles *Arbetar Esperantisten* för år 1940. Vårt organ börjar nämligen med nästa nummer sin 19:de årgång.

Tidningen kommer även i fortsättningen att redigeras efter de principer och riktlinjer, som den förut följt. Givetvis blir innehållet, såväl till kvantitet som till kvalitet, beroende av det material, som av de medarbetande medlemmarna ställes till redaktionens förfogande. Enär våra ekonomiska resurser ej tillåta oss att av skolade författare inköpa material, blir det medlemmarna själva, som genom sitt aktiva deltagande inom den svenska arbetar-esperantorörelsen och genom sitt medarbete i tidningen föra fram densamma.

Tidningen för år 1940 sändes till prenumeranterna endast i den mån prenumeration verkställes. De medlemmar av förbundet, som äro anslutna genom klubb, skola anmäla prenumeration hos klubbens prenumerantsamlare, som sedermera för medlemmen rekviderar tidningen och insänder avgiften. Andra medlemmar och övriga abonnenter ha att själva genom postgiro verkställa prenumeration & tidningen. Glöm härvid icke att å inbetalningskortets kupong angiva ändamålet med inbetalningen.

Endast de, som senast den 5 januari verkställt prenumeration, kunna beräkna erhålla tidningen då densamma den 12—15 januari expedieras. De, som verkställa prenumerationen senare, få vänta omkring en vecka innan efterrekvisitionerna beräknas uppgå till så stort antal att en ny sändning av utgivarekorsband kan sändas. För underlättande av expeditionens arbete anhålles att prenumeration i största möjliga utsträckning må göras före den 5 januari.

Till kommissionärer, vilka ej anmält ändring av antal exemplar, och vilka ej häfta i skuld genom bristande redovisning, utsändes samma antal exemplar som förut.

Prenumerationspriset förblir oförändrat. Således för helår kr. 2:50

(danska prenumeranter betala danska kr. 3:—). Medlemmar av SLEA, vilka betala sin årsavgift till förbundet, erhålla tidningen för kr. 2:— per helt år (medlemsabonnemang). För erhållande av denna förmån fordras dels att årsavgiften erlagts, dels ock att prenumerationen göres för hela år 1940. SLEA-klubbarna ha erhållit cirkulär huru de härutinnan skola förfara. De enskilda medlemmarna (de som äro direkt anslutna till förbundet) böra uppmärksamma att årsavgifter för dem numera är 3 kronor, vartill kommer inträdesavgift med 1 krona, för den som icke är medlem år 1939.

Prenumerant, som erlagt prenumerationens avgift för helt år, äger rätt att erhålla ett s. k. propaganda-abonnemang för kr. 1:25 per helt år. Med propagandaabonnemang avses prenumeration för till exempel kafé, restaurang eller annan offentlig lokal, där tidningen kan nå personer utanför vår rörelse och därmed sprida kännedom om Esperanto och vår esperantorörelse.

Vi anhålla att medlemmarna och klubbarna må göra en kraftanstängning för att antalet prenumeranter avsevärt måtte ökas. Vår upplaga är alltför låg och vi vädja till varje vår medlem att medhjälpa för att höja densamma.

Men även om antalet prenumeranter ökas, behöves det ändock regelbunden försäljning av lösnummer. På varje plats måste det därför finnas kommissionärer. Lösnummerpriset är oförändrat, eller 25 öre per ex.; kommissionärerna redovisa med 20 öre per ex. och ha returrätt för osålda exemplar. Redovisning skall ske minst en gång i kvartalet. Redovisning och prenumeration sker genom att vederbörligt belopp inbetalas på postgirokonto nr 53160, Svenska Arbetar Esperantoförbundet, Stockholm.

Anteckning bör göras å inbetalningskortets kupong om vad det inbetalade beloppet avser. Billigaste sättet att göra beställning är att inbetala förskottsbelopp på postgirokotot. Men anteckningarna på kupongen böra göras klara och tydliga, så att missförstånd icke uppstår.

Gör beställningen till den 5 ja-

## Bekvämt lär Ni Er esperanto

genom den nya  
hermodskursen  
i detta ämne.



**Begär prospekt!**  
**Hermods, Malmö**

nuari om Ni önskar tidningen expedierad då nr 1 sändes, vilket beräknas ske mellan den 12 och 15 januari. Men beställningar mottagas även tacksamst efter ovan angivna datum.

R e d. o c h e x p.

## Amare ironiaj komentoj

pri la milit-sistemo donas la signaturo »Bes» en Social-Demokraten. Li skribas: De Grenlando sciigas, ke la eskimoj tre indignigas pro la milito.

La blankrasuloj frenezigis, ili diras. Li sian fraton alpafas. Kial mortigas la blankrasuloj unu la alian? Kaj kial estas infermaĝinoj senditaj aeren por faligi fajroŝprucantaj kaj mortigajn objektojn sur la igluojn? Stranga malsano certe infektis la cerbojn de la blankrasuloj. Sed, kion faras iliaj saĝaj medicinistoj? Ĉu ili senokupaj sidas en siaj igluoj preterlasante ion fari por kuraci la teruran malsanon?

Jes, tiel ĉabilas la eskimoj. Oni devas senkulpigi ilin pro ilia naiveco. La malevoluinta prudento de tiuj primitivuloj ne permesas al ili kompreni la bonegan en tiu civilizita »kornik-kanto», kies nomo estas milito. Parte oni povas klarigi ilian sintenadon per ilia denaske pacema animstato, kiu por la tuta estonteco malebligas ilian aperigon kiel soldatoj. En la prieskimoa verkego de la dana verkisto Peter Freuchen estas rakontate pri la maniero, per kiu tiu gento venĝas maljustaĵojn kaj insultojn. La eskimo ne mortbatas tiun fraton, kiu insultis lin. Anstataŭe li sendas al sia antagonisto pecon de sia plej bona putra fokviando, kaj, se la malamiko tiam venĝas per donaco de ŝarĝo da bonegaj vulpeltoj al la alia, tiu fulme furiozigas kaj daŭrigas la malamikaĵojn sendante al la malamiko sian plej belan edziniĝeblan filinon. Per tiaj reciprokaj militaj procedoj ĉesigas iom post iom la malamikeco inter la du familioj, kaj ĉio finiĝas per grandiozega edziĝfestoj en la patra igluo, kie la tria medicinisto inaŭguras definitivan pacon inter la batalantoj kaj kiel honorarion li ricevas kuveton da bone konservitaj marbirdoj.

Estas ja evidente, ke por popolo, ĉe kiu regas tiaj barbaraj kutimoj rilate la solvon de disputo, aperigas preskaŭ nevenkeblaj malfacilaĵoj, kiam koncernas kompreni la patentitajn metodojn, kiujn uzas la civilizita homaro por solvi disputojn kaj interrilatojn. Pro tio, ne kondamnu la eskimojn tre servere, kiam ili pro sia naiveco prezentas stupidaĵn komentojn pri la milito!

# "La abituriento."

De *Sven Villas*.

Ni nomis lin »la abituriento». Kial?! Jes, neniu el ni ja *kredis* ke li estas abituriento — same certa ni estis ke li ne estas minlaboristo. Sed kiam li iun tagon, dum ni per la lifto malsupreniris la minejon, kunestis kiam kamarado priparolis, ke li ricevis leteron kun franca teksto, el kiu li nur pene povis legi, ke lia filo, kiu estas maristo, estas akceptata en malsanulejo en Marseille kaj ke tiu estas grave malsana, diris la novulo, kiel li tiam kutime estis nomata, »Kunprenu la leteron morgaŭ, eble mi povas vin helpi». Li kaj legis kaj respondis la leteron, kio havigis al li la nomon, aŭ pli ĝuste, titolon »abituriento». Abituriento estas personigita klerkaj saĝeco, kaj saĝecon havas ja tiu, kiu scipovas fremdajn lingvojn, proksimume tia estis ja la logiko de la rezono ĉe ni minlaboristoj, kies klerco ne ampleksis multe pli ol kiu apartenas al nia enmineja laboro.

Mia unua renkontiĝo kun li formiĝis en aventuro malgranda. Laŭkute ni prenis lokon en karboĉaro por lasi al ŝnurfervejo nin transporti internen en la minon. Tiu ŝnurfervojo kondukis ĉirkaŭ 1,500 m. en la minon al punkto, kiun ni povas nomi dua ŝakto, aŭ eble stacio, kie la ĉarotrenistoj lasis la plenajn, kaj prenis la malplenajn ĉarojn. En galeria vojeto kondukis paralelrelvojo, super kiuj kuris daŭre ŝtala dratsnuro, kiun oni metis en specialkonstruitan forkon en la ĉaro fiksitan, tiel estis tirataj al la ŝakto por malplenigo la ŝarĝitaj kaj internen en la minejon la malplenajn ĉarojn. Evidente ni uzis tiun eblon por nia translokiĝo al kaj el la laborejo.

La abituriento, kiu laboris kiel diverslaboristo en variaj lokoj de la mino estis translokigita al nia laborejo kaj estis lia unua tago tie kiam ni, li kaj mi, prenis lokon en ĉaro por komenci vojaĝon internen en la mino. Kiam ni vojaĝis ĉirkaŭ la duonan distancon nia ĉaro subite pro nekonnata kialo elreliĝis. Tie ni sidis kiel du ratoj en negranda kaptilo. La ŝtalsnurego trenis pluen sed nia ĉaro restis senmova. Se la situacio momente ne estu konsiderata danĝera,

tamen ĝi estis sufiĉe malagranda. La libera spaco inter la supra rando de la ĉaro kaj galeria tegmento estis proksimume 15 cm. precize kiom estis necesa por la forko, sed tro malgranda por ke ni povu elrampi la ĉaron. En la vojo iris ankaŭ signaldrato per kies helpo oni povis haltigi la maŝinon, kie ajn oni troviĝis survoje, sed kiam nia ĉaro elreliĝis ĝi iris for de tiu signaldrato rezulte ke ĝi troviĝis ne atingebla. Ni aŭdis kiel ĉaroj venas post ni. Baldaŭ ili atingos nin. Sen ke ni povas tion malhelpi ili amasiĝos, interpuŝiĝos,



...mi akompanis kamaradon en la galerion por informiĝi pri la okazintaĵo...

elriĝos kaj kiu scias, antaŭ ol helpo venos ni povos esti ĝismortpremataj en tiu haoso, kiu neeviteble estiĝos. Kun pala vizaĝo kaj timo en la okuloj la abituriento demandis, kiel ni agu. Mi, kiu jam havis kelkjaran sperton pri minlaboro klopodis ŝajnigi »specialisto» en tiaj situacioj kaj kun fakula tono mi deklaris, ke ĉio facile ordiĝos, — tamen mi ne povis diri kiel. La situacio tamen ordiĝis — sed nur post multaj vanaj provoj de nia flanko. Per la forko ni klopodis atingi la signaldraton sed bagatelaj centimetroj mankis. Kaj nur kiam mi ekhavis la ideon etendi la unu kruron super la rando de la ĉaro, kiel mi sukcesis per mia ladobroderita lignoŝuo fari kontakton je la signaldrato, mi povis haltigi la ŝnurfervojon. Nun ni nur devis atendi. Baldaŭ venis helpo. Nian ĉaron oni re-

metis sur la relojn kaj ĝi trotaĉis pluen kun la abituriento kaj mi.

\* \* \*

Kiel mi jam diris, ministro li ne estis. Kio devigis lin resti en metio por kiu li ne havis minimumon da talento estis kaj restis por ni nesolvebla problemo. Por vivi kaj labori en mino necesas, ke oni jam juna venas en tiu laboro. Kun aliaj vortoj. Oni devas kreski kaj maturiĝi laŭ la kondiĉoj de tiu peza laboro. Transformi jam maturiĝintan korpon oni nur malfacile povas. Sed tamen li eltenis. Se li estus veninta, — kiel multaj aliaj — kiuj laboris unu tagon, malbenis kaj nomigis la minon je maksimumo de inferaĵoj, finis kaj malaperis, tiam oni povus lin kompreni kiel homon, kiu volas provi la multajn diversajn variaĵojn de la vivo. Sed tia li ne estis. Lin regis ia speciala obstino, kiu verŝajne ne permesis al li rezigni. En liaj okuloj aperis larmoj kiam fojon laboristo lin riproĉis pro trolonga prokrasto je livero de karboĉaro. — Tiam mi opiniis lin malhardita kaj malŝaga. Sed kiam li trenis ĉarojn en por li nekonnata galerivojo kaj tie ekhavis sian tutan dorson senigita ĵe haŭto, de la kolo ĝis la dorsfino, tiam mi lin komprenis. Estis ne tiam individuo, kiu pro doloriga vundo ploris, sed ekstreme obstina naturo, kiu spite de ĉio tamen estis submetonta sin nevenkeblaj malfaciloj. Sed pligrandaj fortoj estis bezonataj por ke li rezignu — kaj tiam por ĉiam.

\* \* \*

Estis kristnaskvespero, jam tagmeze mi sidis en la galerio kaj kun kamarado priparolis kiel agrable estos ferii dum la kristnaskotagoj kiam aperis ĉartrenisto, kiu pro eksciteco nur povis balbute nin sciigi, ke certe io okazis al iu kamarado J. kiu laboris en galerio je distanco de 250 m. de ni. La trenisto diris, ke li venis tien kun ĉaro, sed kiam neniu lampo lumis en la galerio li vokis J. per lia nomo, sed neniu respondon ricevis. Ni rigardis la aferon pli neserioze opiniante ke J. nur foriris momenton pro ia prizorgo. Mi tamen akompanis la kamaradon en la galerion por informiĝi, ĉu io estas okazinta al J. Ni vokis ankoraŭ du kamaradojn dumvoje kaj estis kvarope kiam ni alvenis la laborejon de J. Neniu lampo lumis kaj je

niaj vokoĵ venis neniŭ respondo. Unu kamarado prenis sian lampon intence eniri la galerion, sed irinte nur kelkajn paŝojn lia lampo subite estingiĝis. Tiam ni komprenis kiel okazis. La aero estis tiom malriĉa je oksigeno, ke la lampo ne povis bruli. Ni ankaŭ komprenis, ke J. verŝajne ne rimarkis la kreskantan danĝeron, en kiu li troviĝis, sed fariĝis senkonscia kaj lia lampo estingiĝis. Kiel ni nun agu? Evidente J. troviĝis en situacio bezonante rapidan helpon. Sed iri en la galerion sen iaj ajn akcesoraĵoj estus same kiel memmortigo. La abituriento alvenis kaj estis informata pri la situacio. Unu kamarado forkuris por havigi bezonendajn ilojn. Dum la tempo ni povis nenion fari, nur atendi. Oni devas havi bonan kontrolon je siaj nervoj kiam oni en momento de danĝero volas efektive interveni. Oni devas ankaŭ havi bonajn nervojn por sidi neaktiva kiam oni scias, ke kamarado troviĝas en danĝero tre grava nur kelkajn metrojn de oni. Mi ne scias kio okazis al la abituriento kiam li subite je la eldiro, »mi iras«, komencis rampi en la galerion. Eble liaj nervoj ne eltenis la streĉadon, eble li subtaksis la riskon. Ni vidis kaj aŭdis lin rampi pluen. Ni vokis al li reveni. Sed li ne respondis kaj post momento ĉio ree estis silenta — morte silenta. Daŭris kelkajn minutojn — longajn kiel horoj — kaj venis helpo kun necesaj aĵoj. Oni eniris la galerion kaj trovis ambaŭ. La abituriento estas atinginta J. Oni trovis lin kun firma preno je la piedo de J. Verŝajne li intencis treni tiun post si el la galerio. Sed la peno en la preskaŭ senoksigena aero fariĝis tro granda. J. jam estis mortinta, sed la abituriento montris etajn vivsignojn. Li sangis forte el nazo kaj buŝo kaj mortis tuj poste, sen ricevi la konscion.

Oni eble povus diri ke li estis farinta tiun sian lastan agon en nekomprene pri kio li faris. Sed mi ne kredas. Kvankam li neniam povis tute solvi la problemojn en la laboro de la mino, tamen malsaĝa li ne estis. Oni povas esti obstina ĝis ekstremo, kiel helpas tio, kiam oni venas en situacion, kie ne eltenas la nervoj la streĉadon, kiun kaŭzas la cirkonstancoj.

Kiam mi, kun la senviva korpo de »la abituriento« en ĉaro, vojaĝis la vojon al la ŝakto mi pensis pri nia unua komuna envojaĝo kaj... ploris — mi estis ja nur knabo tiam.

## Por nia honoralbumo.



*Edvin Aldrin.*

Edvin Aldrin, samjar- eĉ sammonataĝulo al nia Karegulineto atingis sian 40-an jaron. Naskiĝinte en Stjernfors la 11-an de novembro 1899 li tie eluzis la infanŝuojn. Post provoj en diversaj profesioj li 20-jara vizitis la teknikan lernejon de Västerås por poste, loĝante en Skoghäll, sin dediĉi al la lignaĵkonstrua fako.

Kutime oni diras pri 40-jarulo: ĉu li vere estas tiom aĝa? Sed pri Aldrin oni vole nevole diras: li nepre estas pli aĝa. Ne pro la trajtoj — ĉar li ankoraŭ estas vera Adoniso — sed pro la laboro de li farita. Li laboregis en multe da organizoj, neniam sin ŝparis, kaj ĉiam oni lin renkontas entuziasmigante staranta en la unua vico.

Ne malplej profitis liajn energion, inteligenton kaj oratorecon en la esperanta laboro. Li traplugis la tutan regionon propagandante nian aferon. Sperta esperantisto, eminenta tradukanto kaj preleganto li estas. Tutnature ni lin utiligis en la kursgvidado. Li partoprenis SAT- kaj SLEA-kongresojn kaj sekve havas geamikojn tutmondskale.

Kamarado Aldrin vi estis la unua, kiu levis la verdruĝan standardon en nia provinco, kaj via daŭra fidelo al nia afero garantias ĝian antaŭeniron. Akceptu niajn dankon kaj gratulon elkore venintajn!

13191.

## Sinceran dankon

*al vi ĉiuj, kiuj per floroj, donacoj kaj telegramoj honoris min je la datreveno de mia naskiĝtago.*

*Elsa Lindberg.*

## La Justeco kaj la Paco

kaj la rimedoj por ilia defendo.

(Resumo de parolado de la finna docento *F. Iversen.*)

Ideon oni povas perforte disvastigi kaj ankaŭ defendi. Sed, se ĝia ekzisto estu perforte fondata, ĝi ĉiam estos malsekura. Nur kiam ĝi estas fondata sur konvinkiĝo, ĝia ekzisto estas sekurigita. Napoleon diris: »En ĉi tiu mondo troviĝas du potencoj, la spirito kaj la glavo; en la daŭro de la tempo ĉiam venkas la spirito.« La leĝregula soci-ordo en jurŝtato estas produkto de spirita evoluo, kiu plej profunde bazigas sin ne sur la perforto sed sur la spirito, t. e. sur la sento pri justeco de la plej multaj civitanoj.

Sed troviĝas ideoj, kiuj absolute ne povas esti perforte defendataj, ĉar ili mem batalas kontraŭ la perforto, kia ĝi estas nuntempe komprenata, t. e. la senhezita uzado de la teknika kaj »morala« aparato de la milito. Tia ideo estas ekz. la kristanismo; la nura penso ĝin perforte defendi plenigas nin per abomeno. Rilate aliaj ideoj la afero estas same klara, sed malpli tuj evidenta. Tiel ekz. militila defendo de la demokrata ideo estas evidenta interna kontraŭdiro, ĉar la demokratio finfine estas unueca kun la respekto al la homa digno, dum la milito estas konsekvence konstruita amasprofanigo de la samo. Sed la milionoj, kiuj nuntempe voke postulas — armilan — defendadon de la demokratio, ne ankoraŭ komprenas tion. Fakte per tio oni celas — konscie aŭ malkonscie — la defendon de la ŝtatoj, kiuj ankoraŭ havas demokratian administradon, sekve oni ne celas la defendon de la demokratio kiel ideo.

Tial estas evidenta — precipe por ni pacifistoj —, ke la ideoj de justeco kaj paco, kiuj estas fundamentaj por niaj vivkonceptoj kaj anima sintenado, apartenas al tiuj ideoj, kiuj ne estas perforte defendeblaj, krom tio, ke tiu perforto detruas — aŭ pli korekte — perfidas tion, kion ĝi estas celita defendi. Nur pripensu kion signifas defendi pacon per milito. Estus kiel defendi la veron per mensogo. Kaj pri la justeco la kontraŭdiro ne estas malpli akra, la milito estas la plej granda kontraŭjura stato,

kion oni povas imagi; tion esprimas jam la antikva roma proverbo: »inter la armiloj silentas la leĝoj».

Sed, mi aŭdas iun diri, dum la nuna malafabla tempo, kiam la mondkonscienco estas mutigita kaj la perforto triumfas super la justeco kaj la vorto paco estas konsiderata aparteni nur al la lipoj de frenezuloj, dum ĉi tiuj lastaj tempoj oni ne havas rajton elekti rimedojn eĉ kiam koncernas defendi la ŝajnan justecon kaj la karikaturan bildon de paco — la armita paco —, kiujn oni ankoraŭ eble povas defendi. Jen estas ekstrema kriza situacio, kiu ne konsideras kaj ne povas konsideri la rimedojn.

Al tio ni komence respondas, ke — kiom multe aŭ malmulte la ekzistanta karikaturo bildo havas komunan kun la justeco kaj la paco, kiujn ni celas — la maniero tiel defendi ilin, t. e. per la metodoj de la nelimigita perforto, estas kontraŭ ilia ento. Plie ni ne forgesu, ke ankaŭ post la plej malhoma milito sekvas »pacigon» kaj ke ĉe tia paciĝo triumfos nur la plej sanga maljusteco kaj venĝo. Se oni ekuzas la perforton por defendi eron da justeco, estas antaŭ ĉio la metodo mem la plej kontraŭleĝa kaj la rezulto, la »paciĝo», estos maljustaĵo, multoble pli granda ol tio, kion oni opiniis evitigi. Kaj fine — kaj tio estas por la porpacaj batalantoj la plej terura — per tio oni ekprenus la vojon de la perforto, la militon, kaj oni forlasas la idealon de justeco kaj paco. Oni ne estus batalinta kaj perdinta — tio ja estas ankoraŭ honorige — sed oni estus perfidinta ilin.

Sed, ree mi aŭdas la timkorulon diri, tiam ni ne havas defendon sed devas mutaj kaj senreziste observi kiel la perforto kaj la maljusteco gajnas novan venkon kaj plie ankaŭ devigas nin sub ilian jugon. Kiel evoluigis en Rusujo kaj en Germanujo kaj en la landoj, kiujn ili iom post iom devigis sub iliajn influon? La pacifistoj kaj la idealistoj konsumiĝas en koncentroj kaj ne havas eblecon labori tie aŭ ili lasis sin devige nei sian konvinkigon kaj almenaŭ ŝajne subteni la sistemon.

Je tio ni devas humile respondi, ke ni sentas la plej altan admiron kaj atestimon por tiuj, kiuj ĝis martireco povas esti fidelaj al sia konvinkigo kaj ke ili laŭ nia opinio tiel — per siaj suferoj kaj persisto — portas sian aferon antaŭen, se ne en ekstera videbla formo, tamen — kaj ne malplej — per aldonado de nova, interna

## Kial?

*Ho, diru, kial homo  
en la milit' buĉiĝas,  
se por viv', kreo, bono  
li kun priben' naskiĝas*

*Por kio taŭge servas  
cerb'lia en la kapo,  
se brute li diskrevas  
pro la obusa frapo?*

*Patrinoj, kial filojn  
vi vartis kaj karesis,  
se preni la buĉilojn  
al ili vi permesis?*

*Knabinoj ĉarmaj, kial  
amatoj karajn viajn  
vi sendas por mortigi  
amatojn de aliaj?*

*Vampiroj, monstroj, ŝarkoj!  
Ĝis kiam, pro avido,  
nur sang', detru', masakroj  
sur la terglob' sen brido?*

PARIO.

forto, la forto, kiu disradias de la libervole donata ofero, kiu, tion ni devas konfesi, en miloj kaj miloj da kazoj estas donataj sur la batalkampoj. Sed ankaŭ se ni de neniu volas postuli tiun oferon, kaj en tio ni niaflanke malsimile al la advokatoj de la perforto volas akcenti la libervolecon de la ofera ago kiel unu el la plej altaj moralaj valoroj, ni tamen starigas ĝin kiel la finfinan kaj plej altan simbolon por la defendo de la justeco kaj paco.

Sed inter ĉi tiu paŝo, kiun ni povas nomi fali sur la glora kampo, kaj forlasi la batalon, kiu ni povas nomi perfidi la idealon, troviĝas defendmetodoj diversspecaj, parte individuaj kaj kolektivaj, parte konstantaj, ĉiam kun longa perspektivo efikantaj metodoj, kaj fine parte okazaj metodoj de strategia naturo, postulataj de certa situacio.

Al la metodoj kun longa perspektivo apartenas antaŭ ĉio edukado kaj klerigado kun kristana-etika, humanisma kaj universala modelo. Tia klerigado kondukas en la daŭro de la tempo al animstato, por kiu la justeco kaj la paco estas memsekvaj. Tia ĝenerala vivkoncepto, kiu estas dediĉita al kaj subtenata de la plejmulto de la homaro kaj kiu estas nediskuteble aprobata de la respondecaj gvidantoj de la popoloj estas la sola sekura garantio por la justeco kaj la paco.

Kaj eĉ se la mondo nun inter t. n. gvidantoj havas personojn kun moralo de malalta kvalito kaj mankas eminentajn personojn, kiuj povus ĝui ankaŭ la atestimon de la kontraŭuloj, estas tamen fakto, ke la ĉi tie priparolata kleriga idealo havas senombrajn sincerajn anojn kaj simpatiantojn en ĉiuj landoj, sennombraj, kiuj nur atendas la baldaŭan ŝanĝon de la »sistemo», por ke ili povu sekvisian plej koran deziron. Tio estas tre grava ebleco de la pacifistoj, ke iliaj ideoj estas en la sama linio kun la plej alta homa evoluo kaj povas pro tio neniam esti definitive subpremataj. Tion ni povas esprimi tiel, ke la justeco kaj la paco defendas sin mem, de ni ili nur postulas, ke ni ne perfidu ilin. Tial estiĝas la triumfo de la perforto, kiom ajn superega ĝi ŝajnas esti, nur mallongdaŭra — eternecmezure — kaj ĝia sukceso estas pli ŝajna ol reala. Kiom profunde dolorigas nin, ke ni devas observi la ofendadon de la justeco kaj ankaŭ ke la bruteco iras tie, kie jam ekelkreskis humaneco kaj harmonio, ni tamen scias, ke la malbono kaj la hommalamikeco fine malvenkos, kaj tio estos ĝia fino des pli frue ju pli fidelaj kaj kuraĝaj ni staras en nia batalo.

Mi ne povas ekargumenti la t. n. strategiajn batalmetodojn; ili estas, kiel dirite, postulataj de la cirkonstancoj. Tamen ne estu tie ĉi forgesata la vorto »la pasiva kontraŭstaro».

Nepra fidelo — cele kaj rimede — al la justeco kaj la paco, en intensa kaj konsekvensa edukad- kaj kleriglaboro en la servo de tiuj ideoj, viva atento je ĉiu aperanta ebleco kaj sufiĉa toleremo, jen estas eble kelkaj el la plej esencaj defendrimedoj por tiuj idealoj ankaŭ en niaj severaj tempoj. Ni eble estos repuŝitaj, premitaj kontraŭ la muron aŭ faligitaj, sed kie ajn ni staras, ni staru kiel kontraŭuloj de la perforto kaj ne kiel ĝiaj kunlaborantoj.

*El la gazeto Freden, la Paco.*

## Ny Johan-Olovbok.

Folket i Bild har även i år utgivit en Johan-Olovbok — »Mödrar, fästgör och hustrur». Den innehåller ett tiotal folklivsskildringar, i vilka författaren skildrar olika kvinnotyper i den ordning som vi män lärt känna och värdera dem. »Mödrar, fästgör och hustrur» rekvideras direkt från Folket i Bild och kostar endast kr. 2: 25.

Ago.

# Ljuset i mörkret.


Julen är ljusens tid. I alla hem, hur enkla de än äro, söker man skaffa ett litet ljus.

Ljuset i mörkret är för oss esperantister vårt språk, esperanto. Det är böckerna som fångar vårt intresse, böckerna äro för oss esperantister »ljuset». Ha vi en bra bok på esperanto så nog finner vi den som en ljusstråle i mörkret. Zamenhof är det förnämsta ljuset i vårt mörker. Hans verk och översättningar, göra det för oss lättare att leva igenom denna mörka världstid.

Ljuset i vårt mörker är även den verkligt sanna sammanhållningen i dessa tider. Vi som leva här i den ljusa norden, förstå kanske ej att fullt värdesätta vårt ljus, vår frihet, vi ha ej den direkta känning av mörkret ute i världen, som de, vilka äro bosatta i andra länder. Men vi äro ännu inte helt isolerade från yttervärlden. Våra vänner och kamrater i andra länder, följa säkerligen med samma spänning som vi, utgången av de mörksens gärningar som präglade vår tid. De tänka på oss, som har ljuset ännu — men tänka vi lika ihärdigt på dem? Troligen inte. Vi måste förstå att det finnes tusen och åter tusen esperantister, som med glädje skulle önska sig en ljusglimt i allt sitt mörker. Vad är då att göra för att lysa upp deras tillvaro, och på vilket sätt bör detta ske? Jo, genom att visa dem den verkliga solidariteten — visa dem att vi, som ha ljuset kvar, håller samman. Hjälpa dem att förstå att vi ännu äga ljusets gåva, friheten — omkring oss, genom att t. ex. sända dem en liten bok, gärna ett litet enkelt häfte, *men på esperanto*, för att därmed ge dem ett litet bevis på, att vi ha dem i tankarna.

De internationella tidningarna, komma nu ej mera så regelbundet. Många av dessa tidskrifter, ha kanske varit en stor ljuspunkt i våra vänners liv. Denna ljuspunkt bör inte helt släckas ut. Vi böra försöka att låta våra vänner få en smula ljus utav allt vårt.

En liten episod. Ett brev anländer — utan frimärken. Innehållet visar oss mörkret. Det var på vinst och förlust som brevet avsänts. Den skri-



vande ber inte blott om materiellt stöd, utan även om moraliskt. På grund av omständigheterna (sju månader i koncentrationsläger) ingen möjlighet att sända en hälsning ens till de sina i Spanien på grund av brist på frimärken. Här skulle en liten svarskupong kunna hjälpa och det moraliska stödet — tanken, ljusglimten — skulle åter kunna ge livsmod åt den nu i förtvivlan levande kamraten.

En annan, av oss svenskar känd esperantist, som vistats mitt ibland oss, som känt värmen och sett den ljusa norden, som har konstaterat demokratins betydelse och vår frihet, har sänt en hälsning, även han från ett koncentrationsläger. Säkerligen skulle blott en hälsning kunna giva honom en ljusglimt, men ännu mer en bok till att förströ sig med. Vi ha hans adress, liksom även till den andre här ovan omnämnde, skrev till oss. (Vi böra nämligen ej här delgiva namn.)

Vi, som ha ljusets glädje, vi, som ännu ej känt vad detta lidande vill säga, som nu existerar runt om i världen, vi, som ännu ha möjlighet

att leva fritt i ett demokratiskt land, vi skulle kunna göra mycket blott genom att visa vår solidaritet som esperantister, genom att sammanhålla det som byggts upp. Ljuset, ledstjärnan i mörkret för de som misströsta, är vår solidaritet, den internationella sammanhållningen. En liten vänlighet, ett litet bevis i form av en bok eller hälsning, skulle kunna lysa upp tillvaron för dem som leva och sträva i mörkret mot ljuset.

\*

Vår bokförmedling står alla till tjänst! Vi ha allt man vill ha och önskar köpa. Böcker av alla slag. Skildringar, noveller, romaner, upplevelser, läroböcker, berättelser, ja, allt som behövs för att släppa in lite ljus i en mörk tillvaro. En ljusglimt i allt mörker som härskar över jorden. Många av er, svenska esperantister, ha säkerligen korrespondenter någonstans, som ej ha samma möjlighet som vi. Sänd denne korrespondent en bok, en hälsning, och visa att vi i ljusa norden, vill hålla samman med alla dem som äro tvingade till överksamhet på grund av nu rådande förhållanden. Gör Din plikt! Visa Din solidaritet! Från mörkret sträva vi mot ljuset...

*Karegulineto.*

## SAT, vi kara asoci'.

Vi SAT-anoj äro emot någonting så förnedrande som dogmer, påvar och despoter.

Vi SAT-anoj förfäktade det sig utvecklande människosinnets oförytterliga rätt att själv bilda sig sina egna föreställningar och om dömen om allt mellan himmel och jord.

Om mänskligheten förmådde lyda förnuftet, behövde den inte kämpa mot sådana väderkvarnar som skäror, kors, hakkors, spöknippen och liknande otyg.

Må vi försöka på alla sätt följa förnuftet!

Vivu vi eterne, vi,  
defendant de raci',  
SAT, vi kara asoci',  
vivu vi eterne!

*Klas Karlsson.*  
(SAT-ano 20059.)

# Krucportanto.

En la latva tradukis Armont.

Daŭrigo.

Iajn grandajn penadon kaj prizorgadon la maljunuloj ne postulis de sia filo; ili mem konstante moviĝis kiel herbo en akvo de mateno ĝis vespero kaj sian ĉiutagan panon ili perlaboris mem. Sed la afero estis tia, ke Atis ne plu obeis la konsilojn de la patro, primokis liajn admonojn, kvazaŭ tio estus senvalora, ridinda... Atis rezonis neniam multe, sed lia ŝultrolezado, lipkuntirado kaj la flamaj fajreroj, kiuj ŝprucis el liaj cindrokoloraj okuloj, esprimis pli klare ol vortoj.

— Paĉjo, ci estas maljuna, mi estas juna, tial ni restu ĉiu je siaj opinioj; unu la alian ni ne plu konvinkos, nek plibonigos...

Tia estis la respondo de Atis je ĉiuj admonoj de la patro, kiam koncernis honorigon de moŝtaj sinjoroj, vizitadon de preĝejoj kaj kelkajn aliajn aferojn, tiel sanktajn por ambaŭ gemaljunuloj.

La patro provis jen per bono, jen per malamo, sed Atis ne plu estis plibonigebla. Ankaŭ la patrino vane preĝis al Dio, verŝante larmojn dum la nokta silento kaj kaŝe krucosignante sian devojiĝintan filon, kiu matene leviĝis same nekredema, kia li vespere enlitiĝis. Sed la patrino ne volis, ke lia filo pereu kaj tial, ŝparinte du rublojn ŝi iris al la pastro, por ke li preĝu en la preĝejo por Atis. Ĉu pro feliĉo aŭ malfeliĉo, tion ŝi mem ne komprenis, la pastron ŝi ne renkontis hejme kaj la du rubloj restis en la poŝo, sed la sakristiano, la maljuna Svinkis, kiu ankaŭ alvenis al la pastra bieno, rakontis al ŝi, ke la tutan nekredemon, la tutan malbonon en la nuna tempo, disvastigas tiuj libroj de la diablo mem kaj tiuj gazetoj, al kiuj la nuna junularo estas kvazaŭ alŝorĉita.

Nun al panjo Kreilis kvazaŭ skvamoj falis de sur la okuloj: kiel do ili, ambaŭ maljunaj, prudentaj homoj, pli frue ne pensis pri tio? Tio ja estas tiel klara kiel hela tago, ke ankaŭ Atis estis atakita de tiu sama, malbona legado de herezaj libroj kaj gazetoj. Pro tio li ja ĉiun dimanĉon kuris al lernejo, de kie li revenis nur malfrue vespere. Pro tio li ankaŭ ne

ripozas tage, sed ie sin kaŝas en soleco kaj, kompreneble, legas, cedante al tento de malbono...

Ŝi eĉ forgesis danki paĉjon Svinkis kaj ankaŭ adiaŭi, kaj preskaŭ kuretante rapidis al la hejmo por tie esti antaŭ ol Atis ankoraŭ revenos de la kampo. La filon oni devas liberigi de la malbona emo, kiu devojigas lian animon, kondukanta lin rekte al pereco.

En la eta havaĵprovizejo, kie troviĝis la mizera posedaĵo de gemaljunuloj Kreilis kaj ankaŭ la bruna trezorujeto de Atis, ŝi falis sur sian verdan, per ruĝa kaj roza koloroj ornamitan dotokeston, ŝian fianĉinan dotokeston kaj ripozis... Tie en fora angulo, en tiu eta bruna trezorujo, certe troviĝas la danĝeraj libroj, kiuj devojigis ŝian Atis, forlogante lin de malnova, en dikaj kovriloj binita, religia kantlibro, kie estas tiom da belaj kantoj, kiuj mildigas la kordon, tiom da admonoj pri la vojo, kiun iru ĉiuj elektitoj de Dio kaj je tio humiligataj dum la surtera vivo...

Longe, longe ŝi rigardis en la timigan angulon, kiu nun ŝajnis al ŝi plena de nigraj fantomoj, kvankam ĝi antaŭe estis la plej hela angulo de la havaĵprovizejo. Sed estis necese ion fari.

Unue ŝi preĝis »Patro nia«, poste ŝi krucosignis la fantoman angulon kaj per fleksiĝintaj genuoj ŝi direktis sin al la trezorujo de Atis. Tio estis malfacila kaj danĝera laboro, sed ĝi estis farena pro la savo de la animo de Atis. Ŝiaj ostaj, fendiĝintaj fingroj tremegis, kiam ili tuŝis la kovrilon de la trezorujo por ĝin malfermi. Sed la kovrilo ne leviĝis, la ujo estis ŝlosita. Ŝia koro preskaŭ ĉesis funkcii pro malespero, ke ne estos eble fari la neprokrasteblan kaj benindan agon, ke Atis ankoraŭ ĉiam estos lasita al la tento de malbona potenco.

Ŝi tamen sciis, ke Atis, irante por labori, ne kunportis sian ŝlosileton; ĝi devas troviĝi ie en la ejo. Kaj urĝe ŝi komencis traserĉi la poŝojn de ĉe la vando pendanta dimanĉa vesto de Atis, en kiuj ŝi trovis aliajn dubaspektajn paperojn, krajonon, not-

libron, ruĝan ĉifoneton, sed la ŝlosilo de la trezorujeto ne troviĝis tie.

Ŝi jam estis perdinta la lastan esperon, kiam subite ŝi ekvidis ŝlosilaron en polvoplana vandofendo.

Retenante la spiradon, ŝi malŝlosis la trezorujeton kaj per manoj tremantaj parte pro timo, parte pro sankta indigno, kaptprenis ne multajn librojn kaj kajerojn, kiuj troviĝis tie, kaj kun la tuta akiraĵo rapidis rekte al la kuirejo, kie la mastrino, kiel ŝi bone sciis, kuiris kaĉon por la vespermanĝo.

Kun stranga ĝojo kaj kontento ŝi rigardis en la fajrujon, kiam la tien enjetitajn librojn ĉirkaŭis la flamoj, kiam kelkaj pli dikaj librokovriloj ŝrumpiĝis, sed maldikaj folioj momente aliĝis je malpezaj flokoj, kiuj suprenleviĝis kune kun fumo, poste disigante refalis kaj intermiksiĝis kun la cindro. Per la mano ŝi disigis kaj intermiksitis la firme kunpremitajn foliojn, kiuj ankoraŭ ne bone volis bruli, kaj ĝis kiam revenis la mastrino, kiu dum momento forestis, en la fajrujo ardis nur stranga cindroamaseto, kiu, kiel oni povis konstati, ne estiĝis de bruligita branĉaro.

— Kion vi, panjo de Atis, tie ĉi...? Kaj ankoraŭ en dimanĉa vesto? demandis la mastrino mirante.

— Nenion, kara mastrino... Mi nur simple tiel... Atis por mi ja estas la sola kaj mi ne rajtas lasi lin perdiĝi... respondis embarasite panjo Kreilis kaj rapide eliris.

Tio estis terura momento, kiam Atis, post daŭra esplordemandado kaj serĉado finfine eksciis, kio okazis al liaj libroj.

Li ne furiozis, ne insultis kaj ankaŭ ne riproĉis. Sed la rigardo, kiun li ĵetis al sia patrino, disŝiris ĉiujn korligojn kun ŝi. Ĝi ne nur vantigis kaj neniigis la malesperiĝintan maljunulinon, sed ankaŭ paĉjon Kreilis mem, kiu pledis por sia vivkunulino, kiel ŝia laŭleĝa defendanto kaj protektanto.

Kaj ĉiu vorto, kiun tiumomente diris Atis, eniĝis kiel splitohava kojno en la koro de Kreilis, kojno, kiu ne plu estis eltirebla, ĉar ĉiu plej eta movo kaŭzis novan doloregon.

— Panjo, mi scias, diris li kun obtuza voĉo, kiu, tiel ŝajnis, venis el profundegaĵo kaj estis tiel glacie malvarma kiel rigidiga norda vento, mi scias, ke ci tion ĉi faris pro via stulteco, imagante, ke cia ago alportos ian benon kaj kontentigos ankaŭ cian memamon, cian tiel nomatan »patri-



namon». Sed cia servo, panjo, estas tre malprofita, estas tre, tre malbona, kvankam tiel ne estis opiniita... Imagu, panjo, la fabeleton, kiun ci al mi rakontis kiam mi ankoraŭ estis eta knabo... La fabeleton pri patrino, kiu edukis sian filon fariĝi murdisto kaj rabisto, kiu kondamnita je ekzilo en Siberio kaj tirata al la punfosto, adiaŭante de sia patrino, formordis ŝian nazon dirante, ke tia estas lia danko pro la patrinaj penadoj... Jes, ci min edukis ne kiel murdiston kaj rabiston, sed kiel honestan homon. Sed sciu, panjo, ke ankaŭ tiu patrino tute certe ne deziris malbonon al sia filo, sed male ĉion bonan, ĉar alie ja ne estus kontentigita ŝia memamo. La afero ja konsistis nur el tio, ke ŝi havis eraran kaj malbonan konvinkon, ke ŝia filo trovos sian feliĉon murdante kaj rabante. Alivorte oni nomas tian eraran malbonan konvinkon »spirita mallumo«. Kaj ci, panjo, volante min gvidi laŭ via konvinko, kvankam vi ne faris tian teruran krimon, tamen kulpiĝis antaŭ mi, antaŭ mia spirito, kiu havas propran komprenon pri justo kaj vero, kiu ne permesas al mi fariĝi murdisto kaj rabisto, sed kiu samtempe malkovras al mi ankaŭ la tutan malfeliĉon kaj mizeron, kiu estiĝis de nia propra spirita malklereco, de kiu liberiĝi estas ĉies plej sankta devo. Benitaj estas ĉiuj sopirantoj al la lumo, sed ve al tiuj, kiuj pro ia kaŭzo kaŝas tiun ĉi lumon. La lastaj vortoj, panjo, tamen ne koncernas cin, sed tiujn, kiuj kaŝas la lumon malbonintence, sed ci ja, male, tute ne scias, kion ci faras...

Jes, tiel li diris, tiel diris... Ankoraŭfoje rigardante en la okulojn de la patrino, rikane alrigardante ankaŭ lin, la maljunan Kreilis, sian samkarnan patron, li turnis al ili la dorson kaj foriris, tute ne aŭskultante kaj ne atentante la admonajn vortojn, kiujn Kreilis, ĵus rekonsciiginte, vokis ankoraŭ post li.

La ŝlosilojn de sia trezorujeto Atis de nun konstante kunportis, kvankam neniu plu ĝin serĉis, ĉar la patrino ne plu eĉ proksimiĝis al lia angulo de la provizejo: perdita Atis jam estis, je tio oni ne povis ion fari. Tial la maljunuloj silente nur observis, kiam Atis foriris preskaŭ ĉiun dimanĉon al siaj novaj amikoj, de kiuj li ricevis novajn librojn kaj ilin portis hejmen. De ĉio ĉi plu nenio bona estis atendbla, sed ili mem konsciis sian senpovecon por duope venki la filon kaj tial ili paciencie portadis la krucon, iam prenitajn.

La destino de Liena ne longe igis ŝin portadi la krucon, ĉar jam en la jaro post la terura okazintaĵo kun la librobruligado, ŝi fermis siajn okulojn por la eterna dormo.

Kuŝante sur la mortolito, ŝi ankoraŭ provis konverti sian Atis de la erara vojo.

— Fil', ŝi diris, pensu pri Dio... Konvertiĝu, iru al pastro, petu indulgon, li pardonos kaj ci ree estos kristano...

Sed Atis...

Atis kisis la malgrasiĝintan kaj fendiĝintan manon de la patrino, karesis la grizan harareton sur ŝia frunto kaj diris:

— KREDU min, panjo, mi estos kristano ankaŭ sen pastro.

Tiel Liena mortis, havante la konvinkon, ke la filo ne konvertiĝos, sed restos kun siaj opinioj.

Post la morto de la edzino Kreilis estis sola kiel arbo. Lia kruco ne plipeziĝis, sed mankis io, ĉie io mankis. La angulo, ŝajnis malplena, la lito malvarma, la dimanĉoj, malgraŭ vizito en la preĝejo, enuaj. Ankaŭ Atis fremdiĝis de li pli kaj pli.

Jes, Atis... Jam en la posta vintro oni forprenis ankaŭ lin; iuj alrajdis, lin arestis kaj forkondukis. Eĉ ne permesante al li adiaŭi. Ili diris, ke oni lin kondukos malproksimen, tre malproksimen, de kie ne plu estos reveneblo. Kaj estis vero...

Jes, plenumiĝis la profetado de gemaljunuloj Kreilis, paĉjo Svinks kaj la ceteraj gehejmanoj: la sorto de Atis estas bedaŭrinda.

Ekdoloris la koro de Kreilis, en kiun pli profunde eniĝis splithava kojno.

— Fil', fil', pro kio tiel estis necese? flustris liaj sekiĝintaj lipoj kaj li portis pluen sian simplan vivokrucon. Li portis ĝin paciencie, ne riproĉante Dion, nek homojn, konvinkite, ke tiel faras ĉiuj elektitoj.

Ĉe la mortolito de la edzino, li, sin mem trankviligante, ĵuris ke li ornamos ŝian tombon per krudfera kruco kaj por posedigi al si lokon apud la vivkunulino, li pagis tuj por du tomblokoj. Malfacile estis kolekti la necesan monsumon, ĉar la mastro jam taksis tre malalte liajn laborkapablojn kaj la stomako ankoraŭ ĉiutage postulis sian parton.

Finfine la mono tamen estis ŝparita, la kruco pagita kaj Kreilis portis ĝin hejmen kiel egan trezoron. Taŭgan ŝtonon li ankaŭ jam sciis; ĝin li trovis en terparto de Pelicens, sur vojeto en fraksenbosko, kie ĝi

## Aktiebolaget Arbetarnes Tryckeri

FOLKETS HUS, STOCKHOLM

TEL.: 10 22 76, 11 11 92

Postgiro 4739

\*

Rekommenderar sig till utförande av alla slags trycksaker

kuŝis tute kovrita de musko, pro kiu neniu ĝin rimarkis. Ĝi estis kvazaŭ gravurita de homaj manoj je tiom simetriaj sulketoj, kavetoj kaj strioj, kvazaŭ iu nekonata skulptisto en ĝin estus ĉizinta tutan historion de haosopluna homa vivo, notinte ĉiujn dolorplenajn tagojn, ĉiujn malagrablaĵojn per pli aŭ malpli profunde ĉizitaj kavetoj, ĉiun dum la vivo eklumintan radion de espero per pli aŭ malpli granda sulketo.

Ĝi estis malofta ŝtono, kvazaŭ destinita por la kruco de lia Liena. Kreilis ankoraŭ havis du sufiĉe akrajn ŝtonĉizilojn, per ili li mem faros truon, en kiun li metos la krucpiedon, plenversos ĝin per sulfurmiksaĵo kaj per tio la lasta ripozloko de Liena kaj li mem estos videbla longe, longe...

Ĝi ne malaperos tiel baldaŭ de sur la tero, kiel ĉiuj aliaj, baldaŭ putrantaj lignaj krucoj, kiuj nur kelkajn jarojn restas. Sed tiu ĉi estas sufiĉe peza, ĝi ege premas la ŝultrojn, kurbigas la dorson al la tero kaj tial ĝi ankaŭ estas fortika. Ĝi premu, fleksu la staturon; li ĝin portas kun ĝojo kaj portus kun pli granda ĝojo, se ĝi estus ankoraŭ pli peza; ĝi estas ilia memorkruco...

Li estis irinta dek kvin verstojn kaj ankaŭ estis sidiĝinta eble jam la dek kvinan fojon. Pli ol la duonan distancon li postlasis, sed restis ankoraŭ ne malpli ol dek verstoj. Li tamen jam estis en sia regiono, preskaŭ kiel hejme kaj pro tio povis ripozi pli longan tempon, ĉar la piedoj ne plu obeis, ili ŝanceliĝis kvazaŭ ĉe ebrulo tiel, ke ne eblis fari eĉ paŝon rekte antaŭen.

— Ripozos mi ĝis la mateno, li pensis, mi ekiros je la tagiĝo kaj estos hejme je la tempo por la matenmanĝo.

